

16730/29 (1949)

Nederlanda Katoliko

Maandblad van de Nederlandse Bond van Katholieke Esperantisten
„NEDERLANDA KATOLIKO”, gevestigd te 's-Hertogenbosch

Opgericht 29 Augustus 1909
Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd

Redactie: A. F. Leideritz Jr., Vechtstraat 5, Amsterdam-Z.
Vaste medewerkers: J. S. Jansen, Amsterdam en Dr W. J. A. Manders, Venlo

De klok heit **PROPAGANDA**

September is voorbij. September, de maand die een hernieuwde actie inluidt voor de propaganda van de internationale taal. Esperanto moet verder verbreid worden. Elk jaar opnieuw moeten wij bij de aanvang van het studieseizoen onze actie hernieuwen. Elk jaar opnieuw moeten wij er voor zorgen dat er weer nieuwe beoefenaren komen van de hulptaal. Nederlanda Katoliko wil U behulpzaam zijn bij de verbreiding hiervan. Nederlanda Katoliko heeft gezorgd voor een eigen cursus, die zowel gecombineerd mondeling-schriftelijk als uitsluitend mondeling gebruikt kan worden.

Onze actieve afdelingen — en welke wil hiertoe niet gerekend worden? — zullen ook in het komende seizoen zorgen, dat in hun stad weer een Esperanto-cursus loopt.

Tot nu toe waren de afdelingen, die onze eigen cursus voor mondeling onderwijs gebruikten, te tellen op de vingers van één hand. Niettegenstaande dat deze cursus allerwege geroemd wordt om zijn overzichtelijkheid en om de uitgebreide uitleg zoals in geen enkele cursus in Nederland het geval was. Frater Wigbertus noemde de Nederlanda Katoliko-cursus op de laatst gehouden jaarvergadering „een buitengewoon goede cursus”. De redactie berust bij de bekende katholieke Esperanto-pionier P. A. Schendeler. Een staf van leraren over geheel Nederland

staat hem bij met de correctie en mondelinge toelichting bij de lessen.

En nu uw taak: Wilt U in het komende seizoen zelf een cursus geven? Gebruikt dan de Nederlanda Katoliko-cursus als handleiding. De uitgebreide uitleg welke in de cursus is opgenomen, stelt de leerlingen in staat het geleerde thuis nog eens rustig door te nemen. Voor club-lessen wordt de cursus tegen verminderde prijs beschikbaar gesteld. Afdelingen of verspreide leden, die de Nederlanda Katoliko-cursus eens willen gebruiken, vragen hierover nadere inlichtingen bij de administratie.

Geeft U zelf géén cursus? Maakt U daarvoor dan propaganda, onze gecombineerde mondeling-schriftelijke cursus bestaat uit zes en twintig lessen. De totale kosten zijn f 10.— plus f 1.75 voor het boekje „Esperanta Krestomatio”. Helpt U mee om dit jaar 500 cursisten te krijgen? Zodra we dit aantal bereikt hebben, kunnen onze lessen gedrukt worden!

Om U bij de propaganda te helpen, hebben wij twee soorten propaganda-kaarten beschikbaar. Nummer 1 is bestemd om bij U thuis voor het raam geplaatst te worden. Nummer 2 dient opgehangen in parochiehuizen, verenigingslokalen en dergelijke. Degenen die een propaganda-avond wensen te organiseren kunnen hiervoor affiches aanvragen. Al dit propaganda-materiaal wordt kosteloos beschikbaar gesteld mits gebruik wordt gemaakt van de Nederlanda Katoliko-cursus.

Telefoonkaarten kunnen besteld worden à 10 cent per exemplaar. Dit nuttige propaganda-middel is welkom bij ieder die over een telefoon beschikt. Ook U bestelt toch zeker enige exemplaren?

Vermoedelijk worden ook dit jaar weer sluitzegels voor ons gedrukt. Stelt U er prijs op om deze te ontvangen, bericht dit ons even. U krijgt ze dan toegezonden zodra de drukker ze aflevert.

U sluit wel een postzegel voor antwoord in?

Denkt U er aan om ook persoonlijke propaganda te maken? Propaganda van man tot man is steeds de beste. Spoort uw kennissen aan om eens een proefles aan te vragen. Dit verplicht tot niets. Begin direct. Het is nu de beste tijd!

De administratie van de Nederlanda Katoliko-cursus:

A. W. WITHOOS,

Viottastraat 11, Eindhoven, Giro 308475

Onze persdienst

Een van de voornaamste hulpbronnen bij de propaganda van het Esperanto is wel het dagblad.

In de dagbladen kunnen wij dure advertenties plaatsen over onze cursussen, die wij van plan zijn te geven. Maar om grote advertenties te plaatsen, en om dit dikwijls te doen, missen we het daarvoor zo nodige kapitaal.

Hoe is het nu mogelijk om van een annonce welke maar eenmaal geplaatst wordt, zo veel mogelijk te profiteren?

Goede resultaten kunnen alleen dan verwacht worden, als het publiek regelmatig op de hoogte gehouden wordt, dat de Esperanto-beweging nog leeft. Dat het Esperanto nog — en steeds meer — gebruikt wordt. Slechts dan zal een advertentie nut afwerpen. Daar een advertentie alléén de nodige overtuigingskracht mist om het publiek te bewegen deel te nemen aan onze cursussen moeten wij zorgen, dat de dagbladen regelmatig artikelen plaatsen over de internationale taal.

Dit is het best te bereiken indien onze leden hiertoe medewerken.

Onze persdienst zorgt eenmaal per maand voor toezending van enige berichtjes over Esperanto aan de katholieke dagbladen. Dit kunnen wij rechtstreeks doen. Beter is het echter, indien dit gebeurt via een „perulo” in de stad waar zo'n dagblad verschijnt. De „perulo” krijgt van onze persdienst de te verzenden berichten thuisgezonden. Hij behoeft deze — na het formulier van zijn naam en adres voorzien te hebben — slechts bij de redactie van het dagblad in de bus te deponeren.

Verder roepen wij de medewerking in van de afdelingen en verspreide leden, om in hun woonplaats een lid of leden aan te wijzen, die zorgen voor doorzending aan de persdienst van de dagbladen waarin berichten staan over de Esperanto-beweging. Ook dagbladen, waarin berichten zijn opgenomen, die niet van onze persdienst afkomstig zijn, stellen wij op prijs. Kunnen wij op uw medewerking rekenen?

Persdienst van Nederlands Katoliko
Viottastraat 11, Eindhoven

ESPERANTO *iets voor U?*

Dit is de titel van een brochuurtje door Nederlanda Katoliko uitgegeven. Het is gratis verkrijgbaar bij de Libro-Servo: Kasperspad 91, Dordrecht. (Dus niet bij de cursus-administratie bestellen!)

PREĜOKARTO POR PENDIGI SURMURE

Esperanto-Instituto „Malnova Turo”, Eindhoven, eldonis preĝokarton kun la preĝoj „Patro Nia”, „Saluton Maria”, k.a. Bone presita sur bona papero. Bela donaco por via korespondanto. 1 ekz. ngd. f 0.10; 5 ekz. ngd. f 0.25. Eksterlando: 3 ekz. kontraŭ unu int. respondkuponon.

PROPAGANDA-ACTIES EN PUNTEN

1. Actieve deelname aan de internationale gebedsactie voor Rusland, onder leiding van H. de Greeve.
2. In de rubriek „Professor Kors beantwoordt vragen van luisteraars” van de K.R.O. kunnen wij theologische vragen stellen met betrekking tot Esperanto (Babelse spraakverwarring enz.).
3. Zoals het Nederlandse Schriftelijke Studie-centrum te Culemborg onlangs deed, kan onze bond ook pleiten voor **katholiek** onderricht op Esperanto-gebied en pogingen in het werk stellen onze schriftelijke cursus te propageren vanaf de kansel.
4. Bij al onze propaganda moeten wij het zakelijke, technische nut van Esperanto op de voorgrond stellen; in elk geval nooit uit de hoogte neerzien op onze slachtoffers met een toon van: „Wat? Heb jij, stommeling, nog nooit van Esperanto gehoord?” of „Waarom voel je niets voor Esperanto? Ja, eh . . . dat weet ik eigenlijk niet!”
De praktijk leert, dat dergelijke tactloze propaganda een averechtse uitwerking heeft. Niet zelden gebeurt het, dat niet-Esperantisten wel degelijk reële bezwaren tegen Espe-

ranto koesteren. Een zakelijk, verstandig gesprek verricht dikwijls wonderen.

5. Nooit kunnen wij van de geestelijkheid actieve deelname aan de Esperantobeweging eisen. De meesten staan indifereent (niet-vijandig) tegenover onze zaak. Overigens hebben zij belangrijker werk in jeugdbeweging etc. te verrichten.

Sanktaj Ansfried kaj Hereswit

V.

Post la morto de Hereswit ankaŭ Ansfried decidis daŭrigi sian vivon en monaĥejo. Thietmar skribis: „Ne pro ĉagreno, sed por perfektigi sian virtan vivon.”

Tamen Dio decidis alie.

Ĝis tiam Ansfried estis akirinta famon dum la kunvenoj de reĝoj kaj imperiestroj; ĝis tiam li estis brileginta en la palacoj de tiuj granduloj; ekde tiu tempo lia lumo estis metota sur la kandeligon por tiel disradiigi ĝin ĉiuf flanken.

La episkopo de Utreĥt, Boudewijn, mortis en la jaro 994-a (aŭ je la komenciĝo de 995-a). Imperiestro Otto la III-a, petinte konsilon de Notker, la fama episkopo de Luik, elektis Ansfried por estri Utreĥt, tiun de la Normanjoj tiom ege suferigitan episkopan landon, malgraŭ lia petego: „Tiu ĉi manoj, kiuj tiel ofte firmtenis la glavon ne portu la episkopan kurbbastonon kaj la mitro ne ornamu la kapon kiu dum jaroj portis la militkaskon.”

Tamen Otto persistis; li venigis la ĉefepiskopon Evergerus al Aken, kie en la katedralo okazis la episkopiga konsekro. Ansfried metis sian glavon sur la altaron de la Sankta Virgulino kaj parolis: „Ĝis nun per tiu ĉi armilo mi konkeris surteran honoron kaj forpelis la malamikojn de la malriĉuloj kaj vidvinoj; ekde nun mi obeos mian Mastrinon, por ke mi per ŝia helpo akiru la savon de mia animo.”

En Utreĥt li ĉie trovis dekadencan kaj mizeran, kaj baldaŭ ĝi spertos la bonecon de Ansfried kiu nun sidis sur la seĝo de Sankta Willibrord. Multajn posedaĵojn li donacis (kelkajn preĝejojn i.a. li pligrandigis per la vilaĝoj kiujn li posedis en Rien), kaj baldaŭ sekvis posedaĵoj de Frethebold (la heredaĵoj en

Teisterbant), de Otto la III-a (Bommel) kaj de Poppo (Arclo — nuntempe Arkel).

Ĉar la Normanoj ankoraŭ ĉiam minacis la urbojn kaj vilaĝojn Ansfried konstruigis multajn fortikaĵojn. En la jaro 1007-a, post kiam la barbaroj estis detruintaj Theolo (Thiel), granda normanŝiparo sin trovis apud Utreĥt. La enloĝantoj bruligis la tutan havenon por ke la malamiko ne povu uzi ĝin. Alveninte tien, kaj sciiginte ke Ansfried estas la episkopo de Utreĥt, la rabistoj sin retiris. Alpertus rakontas al ni en „De Diversitate Temporum” ke eĉ lia nomo sufiĉis por retirigi ilin.

En 1005-a Ansfried blindiĝis, tamen malgraŭ tio li senlaĉe laboradis. Ne malproksime de Amersfoort sin trovis monteto meze de marĉo. Tie li forhakigis la arbojn kaj konstruigis monaĥejon, kiu estis preta en 1006-a. La unua abato, Weringer, kuin li elektis, kaj la dekdu monaĥoj kiujn lia amiko Notker sendis al li el la S. Vitusabatejo apud Gladbach, sekigis kaj ekkulturis la teron. Tiel estiĝis la abatejo Hoogenhorst (poste Hohorst).

Je kristnasko en 1009-a la grizharulo ege malsaniĝis. Laŭ lia peto oni transportis lin al Hohorst, kaj en la monaĥejo li atendis la morton kiu venis en Majo. En la daŭro de jarcentoj multaj martirlibroj entenas la nomon Ansfried. En la ĉefepiskopujo Utreĥt ekde 1856-a kaj en la episkopujo Roermond ekde 1867a oni solenas lian feston la 11-an kaj la 15-an de de Majo.

En la ĉefepiskopa muzeo de Utreĥt sin trovas evangelilibro el la 11-a jarcento, la „codex Sancti Ansfridi”, kiu, laŭ la latina surskribo, apartenis al Ansfried.

(fino)

J. S. JANSEN

Literaturo:

Muller: La antikva Cartularium de Utreĥt.

Miraeus: Opera diplomatica.

Alpertus: De Diversitate temporum.

Thietmar: Chronicon. Lib. IV, Cap. 22—24.

Moll: Ansfried, episkopo de Utreĥt, viro el la fera jarcento.

Albers: Sankta Ansfried, dekoka episkopo de Utreĥt.

Des Roches: Dissertation sur les comtes de Louvain.

SKIZO DE NIA KONTRAŬ-AKVA BATALEMO

verkita de

H. Ensink, hidraŭlikisto

La ekstera aspekto de ĉiu lando en la mondo rezultas el la kunlaboro de naturfortoj kaj homa aktiveco en tiu regiono. La partopreno de tiuj ĉi komponantoj enorme varias laŭ la regiona sítuo; en Svisujo ekz. la pra-naturo forte impresas nin malgraŭ la evidentaj produktoj de homa civilizacio. Tute alia tamen estas la afero en nia lando. Nenie la homo pli enpremis siajn signojn al la naturo ol ĉi tie. Efektive, la nialanda naturo estas kvazaŭ peco da materia kulturo. Kiam ni daŭrigus nian ĵusan komparon: Svisujo ĉiam restus la karakteriza Alpolando, se forlasita de sia loĝantaro; samkaze nia lando estus tute aliĝinta, eĉ tute pereinta, ĉar la senbrida naturo estus plene neniiginta ĝin.

La plej fruajn formon de nia kontraŭakva batalo ni trovas en la Frisland—Groningaj argilregionoj: la formadon de artefaritaj altaĵoj por ŝirmo kontraŭ altaj alfluaĵoj. Ĝis la sepa kaj oka jarcentoj de nia ero la homo devis ŝirmi sin kaj siajn posedaĵojn kontraŭ altaj alfluaĵoj, dum la fekundajn kampojn oni lasis por nelonga tempo al la sovaĝaj ondoj. Post la katastrofa alfluego en la jaro 839, kiam sennombraj homvivoj antaŭtempe finiĝis, la Frislanda homo evidente deturnis sin por ĉiam de la ŝirmomonteto, kiel fidinda kondiĉo de sia ekzisto, **El tiu epoko datiĝas ankaŭ niaj digoj. Tiam la karaktero de nia kontraŭakva batalo principe transformiĝis. Oni nu plu forkuras al ŝirmita loko, sed rezistas la detruan akvon. Nia batalo kontraŭ la akvo iĝas batalo pri la eterna tero. Tio ĉi lasta estis la tute nova eco de la evoluanta homo en niaj nordaj argilregionoj. Kompreneble, la loĝantaro ankaŭ estus povinta forkuri al la pli altaj kaj pro tio pli sendanĝeraj sabloreĝionoj. La Frislandano tamen preferis la minacatajn argilregionojn kiel ĉiaman patrolandon, kun plena fido je propra povo. Per tiu ĉi prefero li tamen ankaŭ elektis la eternan batalon.**

Ĝis nun tiu ĉi batalo ankoraŭ ĉiam daŭras. Dum la tuta mondo respiris post la enorma dummilita streĉiĝo, nia kuraĝa registaro decidis tuj, meze de la haoso de plena neniigo-milito, malaperigi la sekvojn de la katastrofoj, kiuj trafis la insulon Walcheren kaj Wieringermeer, niajn plej grandajn, plej modernajn

kaj teĥnike plej perfektigitajn venkojn je la maro. Post kvar jarcentoj de varia, sed seninterrompa batalo ni sukcesis aldoni al nia lando la enorman teritorion de 425.000 hektaroj da kulturteroj, t.e. kulturtera pligrandigo de 18 %. Kaj kiam la nunaj endigigoj estos finiĝintaj, ni estos gajnintaj pli ol kvaronon de nia kulturteroj.

Kiam ni aldonas al tiu ĉi gajno la malfacile kalkuleblan, sed tamen eĝan avantaĝon de la dumjarcenta mueldrenado de la malaltaj — kaj depost nelonga tempo ankaŭ de la pli altaj — polderoj, kune kun la pligrandigo de kulturteroj helpe de la jam dum duona jarcento aplikita drenado-sistemo, tiam malaperas ĉiu bezono je kalkulado; kaj ni pensas nur pri la tiom ofte ripetata eldiro:

„Le bon Dieu a créé le monde entiers,
hors les Pays-Bas, qui ont été créés par les Hollandais.”

„La bona Dio kreis la tutan mondon,
Krom Nederlandon, kiun kreis la Nederlandanoj.”

Trad. F. WINKEL

LA VOĈO KAJ LA POPOLKANTO

(kun muzikkritiko pri „La Espero”

verkis

F. MOONEN, muzikinstruisto

En la horo de voĉoj de surteraj vivaĵoj la homa voĉo sendube okupas la unuan lokon. Kontraŭe al la bestoj la homa voĉo ne fiksiĝas al unu aŭ pluraj tonoj aŭ tonfiguroj. La homa voĉo kapablas esprimi ĉiun nuancon de la tuta skalo de emocioj. Kulturinte tiun ĉi voĉon, eĉ unu sola homo kapablas helpe de sia artema spirito emocii milojn da homoj per sia voĉo, serve al artverko, kies verkiston inspiris siavice la voĉo.

Unu el la plej mirindaj homaj esprimoj estas la ĥorkanto, kiam pluraj homoj sonigas siajn voĉojn en diversaj melodioj, kiuj, kune kantataj, formas belsonan tuton. La muzikverkistoj, kiuj antaŭ jarcentoj pioniris rilate la plurvoĉan kanton (ĉar ankaŭ tion ili devis inventi kaj forlukti el la naturo), posedis ĉi-rilate neniun modelon en la ĉirkaŭa naturo: ili kreis tiun ĉi novan formon, ĉar la homa voĉo inspiris kaj kapabligis ilin.

La komuna kantado de granda homamaso, la kantado de iu popolkanto, de multaj homoj kun diversaj vivkonceptoj kaj klereco vekas senton de komunemo. Ĉiu nacio havas sian popolkanton; ĉiu popolo posedas sian trezoron de kantoj, ofte nur buŝe dum jarcentoj transdonitaj de generacio al generacio.

Ĉio ĉi do estis kaj estas ebla, ĉar la homo havas ne nur sonon, sed ankaŭ voĉon: instrumenton, kiu en ĉiu fibro kaj en sia tuto senvualigas sian dian kreinton pro sia perfekteco kaj riĉeco de eblecoj.

La muzikverkisto, kiu verkas por la voĉo, devas tamen konscii pri la specialaj kvalitoj, kiuj distingigas la voĉon rilate aliajn muzikinstrumentojn.

La specialajn rekonilojn de la plurvoĉa kanto oni povas plej bone observi en la tre antikva unuvoĉa kanto de la rom-katolika Eklezio: la gregoria kanto; en la popolkantoj kaj plurvoĉaj artverkoj, kiuj naskiĝis en la florepoko de la plurvoĉaj pensado kaj farado antaŭ \pm 1500. Tiu ĉi plurvoĉa arto estas ankoraŭ senmakula de muzikinstrumentaj efikoj, ĉar la (per)instrumenta muzikado ankoraŭ estis nememstara artesprimo, ankoraŭ tro junnaskita por malfavore influi la vokalan muzikon.

Ĉe la evoluoj de la instrumenta muziko kaj la opero komenciĝas la ruiniĝo de la popolkanto, la sole restinta unuvoĉa kanto, kiu de nun iĝas ĉiam pli afektita kaj nesincera.

La tekstoj iĝas retorikaj kaj patosaj; la melodio iĝas tro forta, vigla aŭ sentimentala.

En la lastjarcentaj popolkantoj ni aŭdas en la kantmelodioj ĉiam pli resoni la influon de la muzikinstrumentoj (precipe la piano).

Nur per abunda pruvomaterialo mi povus montri al la leganto tiun ĉi ruiniĝon. Nur sufiĉu la komparo de kantoj, kiaj „Wilhelmus van Nassouwe” aŭ „Heer Jezus heeft een hofken” kaj „Waar de blanke top der duinen” aŭ „Ferme jongens, stoere knapen”.

La diferencoj en melodio kaj teksto estas evidentaj. Kontraŭ la senmakula sincereco de la unuaj kantoj kontrastas akve la false patoso de la lastaj.

La senantaŭjuĝaj aŭskultanto kaj kantanto ordigos la esperantistan kanton „La Espero” ĉe la lastnomitaj kantoj. La teksto atestas pri ekscitita entuziasmo; la melodio estus tre beleta kiel trumpETFanfaro, kun siaj saltmaj, rumpitaj akordoj. Eĉ

la muzikinstrumenta ĥromatiko ne forestas (en: ĝi la homan tiras familion). La amplekso de la plej malalta ĝis la alta tono estas multe tro vasta: nur persono, kiu bas- kaj tenorkantas kapablos ĝukanti tiun ĉi kanton. La ĝuo de kantado estas nome unu el la plej gravaj faktoroj ĉe la komuna kantado, do ankaŭ ĉe la komuneckanto. La unua konkludo do estas, ke la melodio devas esti atingebla por ĉiu homo kun nekulturita voĉo.

La afero estas sufiĉe grava, ke oni serioze sin demandu, ĉu — kun plena respekto pri Zamenhof kaj ties vivlaboro — ne vivas kompetenta esperantista poeto, kiu kapablas poemfari novan tekston, sen hura-tendenco kaj patosa sento, sed sinceran, objektivan, akcepteblan por multaj homoj kun diversaj vivkonceptoj, gradoj de klereco kaj edukigo.

Nur post naskiĝo de la teksto la muzikverkisto naskiĝos, kiu kun vera simpatio kaj kono de multaj popolkantoj kreas novan melodion, samkvalitan kia la tekston, kiu lin inspiris, kaj krome respondan al ĉiuj vokalaj kaj muzikaj postuloj.

Trad. F. WINKEL

„la arto poetika”

de C. E. R. Bumy

Kiam ni legas la poemojn de niaj hungaraj romantikuloj, ekz Kalocsay aŭ Bumy, nin ĉiam trafas iliaj gramatika ludemo kaj malpeza, rapida stilo, sin esprimantaj en fluaj, facilaj versoj kaj superoriginalaj vortkombinoj. Sendube, ĉiu literaturisto pravas asertante, ke literatura beleco ĉefe konsistas el tĥnika stilperfekto kaj surpriza vortmanipulo, sed malestimante alt-nivelan moralon kiel necesan kondiĉon por literatura perfekto, oni renversas la hierarĥion de perfektecvaloroj kaj similas al straba aŭ miopa kritikisto, kies malsanaj organoj ne plu garantias sinceran ekvilibrantan prijuĝon.

Tamen, kiam ni opinius tiun ĉi lastan literaturan koncepton ege malofta aŭ eĉ foresta en nia esperanto-mondo, ni katastrofe trompiĝus, ĉar ĝuste tiu ĉi ideo propre apartenas al la materialista vivkoncepto, kaj regas eĉ en pluraj anguloj de nia katolika kulturmondo patrolanda.

La plejan ekzemplon de tiu ĉi idearo ni povas renkonti, grimpante sur la pintojn de la altega Parnaso, en la beleta „Parnasa

Gvidlibro", nome en la majstra poemo de C. E. R. Bumy, titolita: „La Arto Poetika". Sprite kaj modestaplombe Kalocsay mem per sia literatura aŭtoritato garantias al la leganto riĉan interesan enhavon. Parte li ja konsentas la ideojn de sia koramiko jene:

Prezentas nun C. E. R. Bumy
 Artan instruon sen timem'.
 En punktoj pli ol unu-du mi
 Konsentas kun C. E. R. Bumy.
 Ĉar ĝin necesis jam resumi
 (Vi devis truon senti mem)
 Prezentas nun C. E. R. Bumy
 Artan instruon sen timem'.

K. Kalocsay

Post laŭ profesora sinprezento en la poema enkonduko Bumy ekplendas pri la artmalŝata plebo esperantista, evidente sen sufiĉa kompreno, ke riĉa, altmorala enhavo nepre necesu por riĉa, altmorala literaturo.

Legu mem lian ŝercon:

Jes, la poemoj elmodiĝis ege!
 Vendiĝas la romanoj, kvazaŭ pano,
 Sur versojn — kraĉas la samideano.
 Enhavon oni volas kaj ne formon,
 La Belo taŭgas nur por trudi dormon.
 La dolĉajn Muzojn kiu volus festi?
 Ja manĝi oni volas kaj digesti
 Al la poeto oni fermas pordojn,
 Rekordojn oni volas kaj ne kordojn.
 Kiu bezonus la kristalajn sentojn?

Ktp.

Kompreneblas, ke tiu ĉi longa poemo nur temas pri stilpropraĵoj, kaj agrable, sed false instruas, ke la enhavo tute akcesoras. Bumy konsilas al Vi:

Ne serĉu konvulsie **novajn** temojn.

Laŭ mia opinio C. E. R. Bumy ĉi-rilate, malgraŭ sia mirinde elokventeco, eraris kaj devojigis nian modestan rondon da esperantistaj poetoj.

Ni esperu, ke li baldaŭ konvertiĝu!

F. WINKEL

Por Pliprogresintoj. SENTENCOJ DE SALOMONO

Ĉapitro XIII

1. Saĝa filo lernas de la patro;
Sed sentaŭgulo malatentas riproĉojn.
 2. La frukto de la buŝo donas al homo bonan manĝon; ¹⁾
Sed la deziro de krimuloj estas perforto.
 3. Kiu gardas sian buŝon, tiu gardas sian animon;
Sed kiu malfermegas siajn lipojn, al tiu minacas pereon.
 4. La maldiligentulo volas kaj ne volas;
Sed la deziro de laboremuloj abunde plenumiĝos.
 5. Vorton malveran virtulo malamas;
Sed malvirtulo kalumnias kaj estas kalumniata.
 6. La virto gardas la vojon de senkulpulo;
Sed la malvirto pereigas pekulon.
 7. Unuj ŝajnigas sin riĉaj, havante nenion;
Kaj aliaj ŝajnigas sin malriĉaj, havante grandan riĉecon.
 8. Per riĉeco oni povas aĉeti sian vivon;
Sed malriĉulo ne aŭskultas riproĉojn.
 9. La lumo de la virtulo brilegas;
Sed la lumilo de malvirtuloj estingiĝas.
 10. Inter fieruloj ĉiam regas malpaco;
Sed ĉe tiuj, kiuj en ĉio akceptas konsilojn, regas saĝo.
 11. Riĉeco rapide akirita, malgrandiĝas;
Sed kion oni iom post iom kolektas per laboro, tio multiĝas.
 12. Espero prokrastita dolorigas la koron;
Sed plenumita deziro estas arbo de vivo.
 13. Kiu malatentas ordonon, tiu malutilos sin mem;
Sed kiu respektas preskribon, vivos en paco.
 14. Animoj ruzaj falas de peko en pekon;
Sed justuloj estas kompatemaj, kaj praktikas kompaton.
- ¹⁾ Greka traduko: La justulo ĝuas de la frukto de la justeco.

FRATER WIGBERTUS VAN ZON

RUZA

La sekcio „Junaj Terkulturistoj” el afabla Limburga vilaĝeto jam longe indignis pro la neprizorgitaj kampoj de samfakano.

Admonoj kaj proponoj por helpo ne povis konsentigi la senzorgan kampulon, por sarki, purigi, kombi aŭ ornami la kampojn. Iun matenon, meze de ege neprizorgita parto da kampofruktoj de tiu kampulo, troviĝis granda tabulo kun la surskribo: „Sinjoro, savu nin, ni pereas.”

La kaŝa plezuro de la vilaĝanoj tamen daŭris ne longe, ĉar la sekvontan matenon troviĝis samloke alia tabulo kun la teksto: „Kion vi timas, etkredantoj?”

PRI LA UZADO DE LA REFLEKSIVA PRONOMO EN ESPERANTO

(En la antaŭa numero oni certe rimarkis la du jenajn preserarojn: timulo **tiam** eĉ sian propran ombron: **tiam** devas esti **timas**; ili sin ĵetis **sin mur** min = ili sin ĵetis sur min.)

III.

Tipoj kaj ekzemploj

Sufiĉas do esplori la diversajn okazojn por klarigi la uzon de la refleksivo. Sube ni citos por ĉiu okazo imagitan tipon kaj ankaŭ ekzemplojn.

A. Ago en predikata verbo

1. Indikativo, ktp.

Tipo: Paŭlo ludas kun Petro kaj vundis sin (= Paŭlon) — kaj vundis lin (= Petron).

Ekz. Mia frato diris al Stefano, ke li amas lin pli ol sin mem (Zamenhof).

Rim. I. Oni devas atenti, ke **kiel**, **kiom**, **ol** estas subjunkcioj, kaj komencas ĉiam novan propozicion, eĉ kiam ties predikato estas neesprimita; oni devas do kompletigi la subpropozicion por kontroli, kiu estas la subjekto: la kunvenintoj elektis lin, kiel sian reprezentanton.

Mi elektis lin, kiel prezidanto (ĉar mi estas prezidanto; la prezidanto estas la sama persono, kiel la **subjekto**).

Mi elektis lin, kiel prezidanton (por fari el li prezidanton; la prezidanto estas la sama persono, kiel la **komplemento**).

Mi faros vian idaron, kiel polvo de la tero (Zamenhof) (tiel multenombra, kiel estas la polvo de la tero).

Se oni volas akcenti, ke la eco montrita de la komparo estas neefektiva, oni uzu prefere „kvazaŭ“:

Ni akceptis lin **kiel** reĝon (ĉar li estas efektive reĝo);

Ni akceptis lin kvazaŭ reĝon (kvankam li ne estas efektive reĝo).

Li estas kiel verkisto tiom inteligenta, kiom stulta kiel fiancisto.

Li estas malpli riĉa ol mi. Li estas malpli inteligenta ol ruza.

Rim. II. Male la faktitivaj formoj ne estas analizataj en du apartajn verbojn (aŭdigi = igi aŭdi), sed estas rigardataj kiel unuopaj verboj: Paŭlo farigis per **sia** frato **sian** malfacilan taskon.

Li sendigis pakaĵon al **sia** amiko.

La abatino lernigis al ŝi ŝian novican preĝon.

2. Infinitivo

Tipo: Kia revo! dormi en **sia** lito (= sia propra) — dormi en **ŝia** lito (= aliulina).

Ekz.: Li ne sciis kion fari pri sia ĉapelo.

(daŭrigota)

FRATER WIGBERTUS VAN ZON

ĈU VI SUKCESIS EN VIA EKZAMENO A?

Tiam vi multe parolu, korespondu kaj legu en esperanto! Elektu librojn kun klara, facila stilo ekz.


| | | |
|---------------|---|--------|
| J. Baghy: | La verda koro | f 1.50 |
| St. Blicher: | Taglibro de vilaĝpedelo | - 0.15 |
| H. Bulthuis: | Idoj de Orfeo, 540 p., tre inter- resa (nur uzitaj ekz.) | - 2.00 |
| | Inferio, romano, bind. | - 2.90 |
| | La vila mano, romano, bind. . . . | - 3.25 |
| W. Fricke: | Universala legolibro | - 1.25 |
| J. K. Jerome: | Tri homoj en boato | - 4.00 |

Haveblaj ĉe la Libroservo:

KASPERSPAD 91 — DORDRECHT

PLEKTAJO

Streĉu vian cerbon, laŭ la moto: „Internaciaj problemoj ne sufiĉas al mi”.



Horizontale kaj vertikale:

1. Bruligilo
2. Profita
3. Oleita
4. Foriru
5. Korpoformo

FR. WINKEL

BALADO DE HOMO

Aŭtuna pluvo skurĝas teron gute
 kaj velkas lasta floro de lekant',
 natur' aŭskultas ĝemajn voĉojn mute,
 eĉ dum en ili sonas cigna kant'.

La teron kovros neĝaj flokoj ŝute
 kaj koron frosto de agoniant',
 buĉata de la morto-spasmo brute.
 La sunon perdis trista heliant'.

Kor' ne komprenas koron en parolo,
 la materi' animon premsufokas,
 mond' homloĝata ŝajnas nekropolo

de l'estonteco, kiun timo blokas.

Jen, homo restis en terura solo
 sen Dio Ve, la homo Lin ne vokas'.

JAN FILIP

MI IRAS

(El kolekto: „Miaj folioj”)

Ĉirkaŭ mi estas nokto terura,
super mi estas nebulo,
mi kanti deziras,
mia koro estas malplena.

Mi iras laŭ stratoj
dumnokte preskaŭ malhelaj,
eĉ ili estas kiel miaj deziroj,
vastaj, grandegaj, sencelaj

Mi iras en nokton malhelan —
mi kanti deziras,
sed mia koro estas malplena

DAMJAN VAHEN—SVETINOV

TOT BESLUIT

Door een samenloop van omstandigheden — het zoekraken van de drukproeven bij de post — komt deze aflevering van „Nederlanda Katoliko” wel wat erg laat uit. Wij bieden onze lezers hiervoor onze verontschuldiging aan.

Het is tevens het laatste nummer van het bondsorgaan, omdat het voorstel, zoals dat door het hoofdbestuur in het Juli—Augustus-nummer van Nederlanda Katoliko geformuleerd stond, met één stem tegen aanvaard is. Dit houdt derhalve in dat binnenkort, namelijk circa 25 October a.s., „Espero Katolika” weer gaat verschijnen, zij het dan in een gewijzigde omvang van acht pagina's, doch met inachtneming van vroegere afmetingen en hetzelfde papier. De eigen mededelingen voor de leden van de bond verschijnen dan in het kader van Espero Katolika.

Wij betuigen tenslotte gaarne onze dank aan hen, die het ons in het verleden mogelijk maakten de redactie van „Nederlanda Katoliko” te voeren.

A. F. LEIDERITZ

